



Chapter 5

Vojaĝu kun Zam 1–10

(A basic course)

Introduction.....	2
Vojaĝo 0 (nul) - Zam, via kunvojaĝanto, prezentas sin.....	3
Vojaĝo 1 (unu) - Bonvenon al Kairo!	4
Vojaĝo 2 (du) - Bonvenon al Novjorko!	5
Vojaĝo 3 (tri) - Bonvenon al Pekino!	7
Vojaĝo 4 (kvar) - Bonvenon al Stokholmo!	8
Vojaĝo 5 (kvin) - Bonvenon al Velingtono!	10
Kvizo 1.....	11
Vojaĝo 6 (ses) - Bonvenon al Rio de Ĵaneiro!.....	12
Vojaĝo 7 (sep) - Bonvenon al Bruselo!.....	13
Vojaĝo 8 (ok) - Bonvenon al Jerusalemo!.....	15
Vojaĝo 9 (naŭ) - Bonvenon al Parizo!.....	16
Vojaĝo 10 (dek) - Bonvenon al Kopenhago!.....	17
Kvizo 2.....	19
Respondoj de la ekzercoj kaj kvizoj.....	20

(**Vojaĝo** means “journey” or “trip”. **Bonvenon al** means “welcome to”.)

Introduction

In this course, you'll travel round the world and visit several cities with Zam. You'll learn a bit about various cities, cultures, and languages. In addition, you'll be able to practice reading in Esperanto and to learn some new words.

For each trip with Zam you'll find:

- some information and a picture of the city being visited
- a short text with translation about something linked to the city
- notes about the grammar and word usage in the text
- a translation exercise
- a fill-in-the-blanks exercise for the same text as above

Once you've made five journeys, there will be a quiz about them. You'll be asked questions about the cities, words, and grammar that you encounter in this course.

There are also MP3 files with recordings of the texts; you can find them at www.ikso.net/libera. We suggest that you listen to each file several times until you can easily understand all the words of the text.

This chapter will repeat some of the material from earlier chapters. But repetition is an essential part of learning a new language.

Bonan vojaĝon! (Have a good trip!)



Ĉi tiujn lokojn ni vizitos!
These are the places we'll be visiting!

Vojaĝo 0 (nul) – Zam, via kunvojaĝanto, prezentas sin

Zam, your traveling companion, introduces himself

Saluton!

Hi!

Mia nomo estas Zam.

My name is Zam.

Mi ŝatas vojaĝi.

I like to travel.

Kelkfoje mi vojaĝas per trajno aŭ buso.


Sometimes I travel by train or bus.

Ofte mi flugas per aviadilo.

Often I fly by airplane.

Kaj nun mi vojaĝos kun vi!

And now I'm going to travel with you!



Vort-listo / Word list

aŭ – or

esti – to be

flugi – to fly

kun – with

mi – I

nomo – name

nun – now

ofte – regularly, often

per – by means of, via, through

saluti – to greet, to salute

ŝati – to like, to appreciate

vi – you

vojaĝi – to travel

Vojaĝo 1 (unu) – Bonvenon al Kairo!

Loĝantoj:	Ĉirkaŭ 16 milionoj.
Population:	<i>Around 16 million.</i>
Ĉefa lingvo:	La araba.
Main language:	<i>Arabic.</i>
Valuto:	Egiptia pundo.
Currency:	<i>Egyptian pound.</i>
Rimarko:	La rivero Nilo trairas la urbon.
Note:	<i>The River Nile passes through the city.</i>
Lando:	Egiptio.
Country:	<i>Egypt.</i>



Vort-listo / Word list

afero – thing, matter, business

alia – another, other

apud – next to, beside, near

bela – pretty, beautiful, handsome

interesa – interesting

ne – not, no

nur – only, just

piramido – pyramid

unu – one

urbo – city, town

Teksto kun traduko / Text with translation

Apud la urbo Kairo, en la lando Egiptio, estas piramido.

Near the city of Cairo, in the country of Egypt, is a pyramid.

Fakte, ne estas nur unu piramido.

In fact, there is not just one pyramid.

Estas pluraj belaj piramidoj apud Kairo.

There are many beautiful pyramids near Cairo.

Unu piramido nomiĝas Keopso.

One pyramid is named Cheops.

Krom la piramidoj estas alia interesa afero, la Sfinkso.

Aside from the pyramids, there is another interesting thing, the Sphinx.



Notoj / Notes

The ending **-o** is used for nouns. For example: **lando** (country) and **piramido** (pyramid).

The ending **-a** is used for adjectives. For example: **bela** (beautiful) and **interesa** (interesting).

The ending **-j** is used for plurals. For example: **landoj** (countries) and **piramidoj** (pyramids).

Tradukekzerco / Translation exercise

- 1) One pyramid. = _____
- 2) Multiple pyramids. = _____

- 3) Beautiful cities. = _____
4) To fly is another matter. = _____
5) Our names are Zam and Maz. = _____

Plenigekzerco / Fill-in-the-blanks exercise

Vortoj: afero, unu, nur, urbo, apud

Apud la _____ Kairo, en la lando Egiptio, estas piramido. Fakte, ne estas _____ unu piramido. Estas pluraj belaj piramidoj _____ Kairo. _____ piramido nomiĝas Keopso. Krom la piramidoj estas alia interesa _____, la Sfinkso.

Vojaĝo 2 (du) – Bonvenon al Novjorko!

Loĝantoj: Ĉirkaŭ 7 milionoj.
Population: Around 7 million.
Ĉefa lingvo: La angla.
Main language: English.
Valuto: Usonaj dolaroj.
Currency: US dollars.
Rimarko: Nomiĝas “la pomego”.
Note: It’s called “the big apple”.
Lando: Usono.
Country: USA.



Vort-listo

bona – good, okay, nice

ĉefa – main, chief

ejo – room, place

en – within, in, inside

hodiaŭ – today

ideo – idea

labori – to work

lando – country

nacio – nation

organizo – organization

pensi – to think

sidi – to sit

Teksto kun traduko

En Novjorko estas la ĉefa sidejo de Unuiĝintaj Nacioj (UN).

In New York is the primary seat of the United Nations (UN).

UN estas tre interesa organizo, mi pensas.

The UN is a very interesting organization, I think.

Bedaŭrinde, multaj landoj ne bone kunlaboras kun UN hodiaŭ.

Unfortunately, many countries do not work well together with the UN today.

Sed la ideoj malantaŭ UN estas vere bonaj.

But the ideas behind the UN are really good.

Eble iam UN pensos, ke Esperanto estas bona ideo...

Maybe sometime the UN will think that Esperanto is a good idea...



Notoj

The ending **-a** is used for adjectives. For example: **interesa organizo** and **bona ideo**.

The ending **-aj** is used for the plural form of adjectives. If a noun is plural, the adjective that describes it must also be plural. For example: **multaj landoj** and **bonaj ideoj**.

Esperanto is a very flexible language. The word **ejo** means a place, but **-ej-** is also a suffix that indicates location.

Tradukekzerco

Big cities. = _____

Good idea! = _____

My primary interest is to travel. = _____

The Sphinx and Cheops are interesting things. = _____

The UN isn't a national organization. = _____

Plenigekzerco

Vortoj: kun, ideo, organizo, en, bonaj

Novjorko estas la ĉefa sidejo de Unuiĝintaj Nacioj (UN). UN estas tre interesa _____, mi pensas.

Bedaŭrinde, multaj landoj ne bone kunlaboras _____ UN hodiaŭ. Sed la ideoj malantaŭ UN

estas vere _____. Eble iam UN pensos, ke Esperanto estas bona _____ ...

Vojaĝo 3 (tri) – Bonvenon al Pekino!

Loĝantoj: Ĉirkaŭ 12 milionoj.

Population: *Around 12 million.*

Ĉefa lingvo: La ĉina.

Main language: *Chinese.*

Valuto: Juanoj.

Currency: *Yuan.*

Lando: Ĉinio.

Country: *China.*



Vort-listo

antaŭ – before, in front of

aŭdi – to hear

emo – propensity, tendency, desire

fari – to do, to make, to act

for – away

ke – that

kontraŭ – against, opposite, across from

milito – war

morgaŭ – tomorrow

vidi – to see

Teksto kun traduko

Ne longe for de Pekino estas la ĉina muro.

Not very far from Beijing is the Great Wall.

La ĉina muro estis farita antaŭ ĉirkaŭ 1800 (mil okcent) jaroj.

The Great Wall was built about 1800 (one thousand eight hundred) years ago.

La ĉinoj faris ĝin por protekti sin kontraŭ militemaj mongoloj.

The Chinese built it to protect themselves against militant Mongols.

Mi aŭdis, ke la ĉina muro estas la sola hom-farita afero, kiu videblas de la luno.*

I heard that the Great Wall is the only man-made thing that is visible from the moon.

Morgaŭ mi vojaĝos al la luno kaj kontrolos tion...

Tomorrow I will travel to the moon and check that out...



* Good thing Zam doesn't believe everything he hears, because it's really only a myth that the Great Wall can be seen from the moon.

Notoj

The ending **-is** is used for verbs in the past tense.

- For example: **estis** (was, is being) and **faris** (did, made, was doing, was making).

The ending **-as** is used for verbs in the present tense.

- For example: **estas** (is) and **videblas** (is visible), **vojaĝas** (travels, is traveling).

The ending **-os** is used for verbs in the future tense.

- For example: **estos** (will be) and **vojaĝos** (will travel).

In English, we call this wall the “Great Wall”. But the Esperanto name actually means “Chinese wall”.

Notice how the word **emo** is also used as a suffix **-em-** in the word **militema**. Esperanto uses many suffixes, and many compound words.

Tradukekzerco

Today I am working. = _____
Tomorrow I will not work. = _____
Three days ago I was in the city. = _____
You were in Cairo and now you are in Beijing. = _____

Plenigekzerco

Vortoj: vojaĝos, estis, for, kontraŭ, aŭdis

Ne longe _____ de Pekino estas la ĉina muro. La ĉina muro _____ farita antaŭ ĉirkaŭ 1800 (mil okcent) jaroj. La ĉinoj faris ĝin por protekti sin _____ militemaj mongoloj. Mi _____, ke la ĉina muro estas la sola hom-farita afero, kiu videblas de la luno. Morgaŭ mi _____ al la luno kaj kontrolos tion...

Vojaĝo 4 (kvar) – Bonvenon al Stokholmo!

Loĝantoj: Ĉirkaŭ 1 miliono.

Ĉefa lingvo: La sveda.

Valuto: Svedaj kronoj.

Lando: Svedio.



Vort-listo

certe – certainly

ĉiu – each, every

doni – to give

grava – serious, important

homo – human being

jaro – year

kaj – and

loko – place, location

okazi – to happen, to occur, to take place

premio – prize, premium

ricevi – to get, to receive

sed – but

Teksto kun traduko

En Stokholmo ĉiu-jare okazas disdonado de la nobelpremio.

In Stockholm every year, awarding of the Nobel Prize takes place.

La premion ricevas homoj, kiuj grave kontribuis al la bono de la homaro.

People who have contributed in important ways to the well-being of the human race receive the prize.

La kampoj de la premio estas certe tre gravaj.

The fields for the prize are certainly very important.

Ili estas: fiziko, kemio, medicino, literaturo kaj paco.*

*They are: physics, chemistry, medicine, literature, and peace.**

La pacpremidonado ne okazas en Stokholmo, sed ali-loke (en Oslo, Norvegio).

Awarding of the peace prize doesn't occur in Stockholm, but elsewhere (in Oslo, Norway).



* The prize for economics is awarded at the same time. But it was founded by the national bank in Sweden, not by Alfred Nobel himself.

Notoj

Using the **-e** ending, you can make adverbs.

For example: **certe** (certainly). You can also use adverbs to mark a location: **ali-loke** = “in another location”, **urbe** = “in the city”. (There are also several adverbs that don't end in -e.)

Tradukekzerco

I fly often.	= _____
It's an important prize.	= _____
I see well.	= _____
You will certainly hear.	= _____
In a certain instance.	= _____

Plenigekzerco

Vortoj: *kaj, sed, homoj, okazas, certe*

En Stokholmo ĉiu-jare _____ disdonado de la nobelpremio. La premion ricevas _____, kiuj grave kontribuis al la bono de la homaro. La kampoj de la premio estas _____ tre gravaj. Ili estas: fiziko, kemio, medicino, literaturo _____ paco. La pacpremidonado ne okazas en Stokholmo, _____ ali-loke (en Oslo, Norvegio).

Vojaĝo 5 (kvin) – Bonvenon al Velingtono!

Loĝantoj: Ĉirkaŭ 200 000.
Ĉefa lingvo: La angla.
Valuto: Novzelandaj dolaroj.
Lando: Novzelando.



Vort-listo

ĉe – at, beside	maro – sea
el – from, out of	mondo – world
granda – large, great, big	ol – than
kiu – who, which, which one	plej – most
kuŝi – to lie, to recline, to rest [in a place]	pli – more
la – the	

Teksto kun traduko

Velingtono estas la plej suda ĉefurbo el ĉiuj ĉefurboj.

Wellington is the southernmost capital city of all capital cities.

La urbo kuŝas ĉe maro, nome la Pacifika oceano.

The city rests next to a sea, namely the Pacific ocean.

La Pacifika oceano estas la plej granda maro de la mondo.

The Pacific ocean is the largest sea in the world.

La aliaj oceanoj estas la Atlantika, la Hinda kaj la Arkta.

The other oceans are the Atlantic, the Indian, and the Arctic.

La Atlantika estas pli granda ol la Hinda, kiu estas pli granda ol la Arkta.

The Atlantic is larger than the Indian, which is larger than the Arctic.



Notoj

The words **plej** (most), **pli** (more) and **ol** (than) are used for comparisons.

Tradukekzerco

- | | |
|---|---------|
| 1) Wellington is the southernmost capital city. | = _____ |
| 2) I think more than I work. | = _____ |
| 3) Which country is the largest? | = _____ |
| 4) I prefer to take the train than to take the bus. | = _____ |
| 5) I prefer to fly. | = _____ |

Plenigekzerco

Vortoj: kuŝas, aliaj, el, kiu, maro

Velingtono estas la plej suda ĉefurbo _____ ĉiuj ĉefurboj. La urbo _____ ĉe maro, nome la Pacifika oceano. La Pacifika oceano estas la plej granda _____ de la mondo. La _____ oceanoj estas la Atlantika, la Hinda kaj la Arkta. La Atlantika estas pli granda ol la Hinda, _____ estas pli granda ol la Arkta.

Kvizo 1

Please choose one of the possible answers. Good luck!

1. Antaŭ du jaroj mi **A)** estos en Tokio. **B)** estis en Tokio. **C)** estas en Tokio.
 2. Kiu urbo estas pli granda ol Novjorko? **A)** Kairo. **B)** Velingtono. **C)** Stokholmo.
 3. En kiu urbo okazas disdonado de la paco-nobelpremio?
A) Novjorko. **B)** Stokholmo. **C)** Oslo.
 4. Morgaŭ vi **A)** vidos. **B)** vidis. **C)** vidas.
 5. Keopso kaj la Sfinkso estas **A)** interesa afero. **B)** interesaj aferoj. **C)** interese afero.
 6. Apud Kairo estas **A)** bela piramidoj. **B)** belaj piramido. **C)** belaj piramidoj.
 7. Kiu maro estas la plej granda?
A) La Atlantika oceano. **B)** La Pacifika oceano. **C)** La Hinda oceano.
 8. Novjorko estas **A)** bela urbo. **B)** belaj urboj. **C)** bele urbo.
 9. Unuiĝintaj Nacioj estas **A)** granda lando. **B)** grava premio. **C)** interesa organizo.
 10. Vi kaj mi vojaĝas **A)** ofta. **B)** oftaj. **C)** ofte.
-

Vojaĝo 6 (ses) – Bonvenon al Rio de Janeiro!

Loĝantoj: Ĉirkaŭ 7 milionoj.

Ĉefa lingvo: La portugala.

Valuto: Realo.

Rimarko: La rioanoj nomiĝas “kariokas”.
The people from Rio are called “kariokas”.

Lando: Brazilo.



Vort-listo

danci – to dance

dum – while, during, whereas

fojo – time, occasion

longa – long

nokto – night

oni – impersonal pronoun; one, you, they

povi – to be able to, can

tago – day

tiam – then, at that time

tie – there, over there, in that place

veni – to come

vivo – life

Teksto kun traduko

Rio de Janeiro estas belega urbo.

Rio de Janeiro is a beautiful city.

Unu-foje jare okazas grandega karnavalo tie.

Once every year, a very large carnival takes place there.

Tiam multege da homoj venadas al la urbo.

Many people come into the city then.

Ili dancadas dum kvar tagoj kaj noktoj.

They dance on and on, for four days and nights.

Apud la urbo estas longega strando, pli ol 4 km longa.

Next to the city is a very long beach, more than 4 km long.

Tie oni povas kuŝadi, naĝadi kaj ĝuadi la vivon.

There, you can lie out, go swimming, and enjoy life.



Notoj

The suffix **-eg-** is used to strengthen or emphasize the meaning of the root.

For example: **bela** (pretty), **belega** (beautiful) and **multe** (a lot), **multege** (a whole lot).

The suffix **-ad-** is used to show that something lasts for a long time or that it happens multiple times.

For example: **danci** (to dance), **dancadi** (to dance on and on) and **veni** (to come), **venadi** (to keep coming).

Tradukekzerco

Great idea! = _____
I kept trying for the whole day. = _____
The night was very long. = _____
They kept coming to us often. = _____

Plenigekzerco

Vortoj: povas, dum, belega, okazas, venadas, urbo

Rio de Ĵaneiro estas _____ urbo. Unu-foje jare _____ grandega karnavalo tie. Tiam multege da homoj _____ al la urbo. Ili dancadas _____ kvar tagoj kaj noktoj. Apud la _____ estas longega strando, pli ol 4 km longa. Tie oni _____ kuŝadi, naĝadi kaj ĝuadi la vivon.

Vojaĝo 7 (sep) – Bonvenon al Bruselo!

Loĝantoj: Ĉirkaŭ 1 milionoj.
Ĉefaj lingvoj: La franca kaj la flandra.
Valuto: Eŭro.
Rimarko: Ĉefurbo. *Capital city.*
Lando: Belgio.



Vort-listo

ankaŭ – also, as well

ĉar – since, as, for, because

ĵurnalo – newspaper, daily paper, journal

kial – what for, why

multaj – many

parlamento – parliament

politiko – policy, politics

relative – rather, fairly, relatively

si – itself, oneself, himself, herself, etc.

tro – too much

Teksto kun traduko

En Bruselo laboras multaj politikistoj.

Many politicians work in Brussels.

Tie estas ankaŭ relative multe da ĵurnalistoj.

There are also a fair number of journalists there.

Kial? Ĉar en Bruselo estas parlamentejo de la Eŭropa Unio.

Why? Because the seat of parliament of the European Union is in Brussels.

Ankaŭ la komisiono de EU havas sian ĉefan oficejon kun oficistoj tie.

The commission of the EU also has its central office and officers there.

Kiom da tradukistoj kaj interpretistoj estas en Bruselo?

How many translators and interpreters are in Brussels?

Laŭ pluraj esperantistoj, tro...

According to many Esperantists, too many...



Notoj

The suffix **-ist-** is used to show a profession or a continuing hobby or way of thinking. For example: **ĵurnalo** (newspaper), **ĵurnalisto** (journalist) and **Esperanto** (Esperanto), **esperantisto** (Esperantist).

The suffix **-ej-** is used to show a place.

For example: **parlamento** (parliament), **parlamentejo** (house of parliament).

Tradukekzerco

- 1) Translators translate. = _____
- 2) I worked in the office for the whole day. = _____
- 3) The parliament meets in the parliament building. = _____
- 4) I am not a dancer. = _____

Plenigekzerco

Vortoj: laboras, tro, tradukistoj, relative, ĉar, ankaŭ

En Bruselo _____ multaj politikistoj. Tie estas ankaŭ _____ multe da ĵurnalistoj. Kial? _____ en Bruselo estas parlamentejo de la Eŭropa Unio. _____ la komisiono de EU havas sian ĉefan oficejon kun oficistoj tie. Kiom da _____ kaj interpretistoj estas en Bruselo? Laŭ pluraj esperantistoj, _____ ...

Vojaĝo 8 (ok) – Bonvenon al Jerusalemo!

Loĝantoj: Ĉirkaŭ 600 000 (sescent mil).
Ĉefaj lingvoj: La hebrea kaj la araba.
Valuto: Ŝekelo.
Rimarko: Pli ol tri mil jarojn aĝa.
Over 3000 years old.



Vort-listo

bedaŭri – to regret, to be sorry about	sankta – holy, sacred
ĉiam – always	sekura – safe, secure
do – therefore, so, then	tiu – that, that one
ekzemplo – example	viziti – to visit
por – for, per, to, in order to	

Teksto kun traduko

Jerusalemo estas sankta urbo por judoj, kristanoj kaj islamanoj.

Jerusalem is a holy city for Jews, Christians, and Muslims.

Do aparte por anoj de tiuj religioj la urbo estas tre vizitinda.

So, especially for members of those religions, the city is very worth visiting.

Vidindaj aferoj en la urbo estas ekzemple la plendomuro, la moskeo "el Aksa" kaj la tombopreĝejo.

Things worth seeing in the city are, for example, the Western Wall, the "al Aqsa" mosque, and the Church of the Holy Sepulcher.

Bedaŭrinde, Jerusalemo ne ĉiam estas sekura por la urbanoj.

Unfortunately, Jerusalem isn't always safe for its inhabitants.



Notoj

The suffix **-an-** is used to show members of a group.

For example: **urbo** (city), **urbano** (inhabitant of a city) and **islamo** (Islam), **islamano** (Muslim).

The suffix **-ind-** is used to show that something is worth doing.

For example: **viziti** (visit), **vizitinda** (worth visiting).

Tradukekzerco

She is a good member of parliament.

= _____

The local people danced beautifully.

= _____

My city is not worth visiting.

= _____

That book is worth reading.

= _____

Plenigekzerco

Vortoj: aferoj, bedaŭrinde, por, tiuj

Jerusalemo estas sankta urbo _____ judoj, kristanoj kaj islamanoj. Do, aparte por anoj de _____ religioj la urbo estas tre vizitinda. Vidindaj _____ en la urbo estas ekzemple la plendomuro, la rokomoskeo kaj la tombopreĝejo. _____, Jerusalemo ne ĉiam estas sekura por la urbanoj.

Vojaĝo 9 (naŭ) – Bonvenon al Parizo!

Loĝantoj: Ĉirkaŭ 13 milionoj.

Ĉefa lingvo: La franca.

Valuto: Eŭro.

Rimarko: Ĉefurbo. *Capital city.*

Lando: Francio.



Vort-listo

alta – high, lofty, tall

fama – famous

ideo – idea

kelkaj – any, some, a few

konstrui – to build, to construct

laŭ – along, according to, by

populara – popular

stulta – stupid, foolish

trovi – to find

turo – tower, castle

Teksto kun traduko

En Parizo troviĝas alta konstruaĵo, kiu nomiĝas la Eiffel-turo.

In Paris, a tall building can be found, which is called the Eiffel Tower.

La turo konstruiĝis en la 1880-aj jaroj, laŭ la ideo de Gustave Eiffel.

The tower was built in the 1880s, based on an idea by Gustave Eiffel.

Laŭ kelkaj, la konstruaĵ-ideo estis granda stultaĵo.


According to some, the idea for the building was a very stupid thing.

Sed la turo fariĝis mondfama kaj hodiaŭ ĝi estas tre populara vidindaĵo.

But the tower became world-famous and now it is a very popular sight.

Alia famaĵo en Parizo estas la Triumfa arko.

Another famous thing in Paris is the Arc de Triomphe (Arch of Triumph).



Notoj

The suffix **-aĵ-** is used to show something concrete, based on an abstract idea.

For example: **stulta** (stupid), **stultaĵo** (stupid thing).

The suffix **-iĝ-** is used to show that something passes to a new state.

For example: **konstrui** (to build), **konstruiĝi** (to be built).

Tradukekzerco

- 1) The tower is becoming more and more famous. = _____
- 2) An interesting event = _____
- 3) I am interested in dancing. = _____
- 4) What a stupid thing! = _____


Plenigekzerco

Vortoj: ideo, laŭ, fariĝis, troviĝas, famaĵo

En Parizo _____ alta konstruaĵo kiu nomiĝas la Eiffel-turo. La turo konstruiĝis en la 1880-aj jaroj, laŭ la _____ de Gustave Eiffel. _____ kelkaj, la konstruaĵ-ideo estis granda stultaĵo. Sed la turo _____ mondfama kaj hodiaŭ ĝi estas tre populara vidindaĵo. Alia _____ en Parizo estas la Triumfa arko.

Vojaĝo 10 (dek) – Bonvenon al Kopenhago!

Loĝantoj: Ĉirkaŭ 1 miliono.
Ĉefa lingvo: La dana.
Valuto: Danaj kronoj.
Lando: Danlando.



Vort-listo

loĝi – to live (somewhere), to inhabit
verki – to write, to compose, to author
prelegi – to lecture, to give a talk
preleganto – lecturer
spirita – spiritual
ekzisti – to exist
agrabla – pleasant, enjoyable
kredi – to believe
amo – love

analizo – analysis
homo – person, human being
besto – animal
agi – to act, to take action
sperto – experience
rekomendi – to recommend
sendi – to send
pozitiva – positive
amiko – friend

Teksto kun traduko

En Kopenhago estas la **eksloĝejo** de Martinus.

In Copenhagen is the place where Martinus used to live.

Martinus estis verkisto kaj preleganto pri spiritaj aferoj.

Martinus was a writer and lecturer about spiritual matters.

Laŭ Martinus ekzistas agrabla bono kaj **malagrabla** bono.

According to Martinus, there exists pleasant good and unpleasant good.

Li kredis je **reenkarniĝo** kaj je amo al ĉiuj.

He believed in reincarnation and in love for all people.

Laŭ liaj analizoj ni, homoj, estas **eksbestoj**.

By his analysis, we humans are ex-animals.

En sia verko li ofte **revenas** al tio, ke ĉiuj agas laŭ siaj antaŭaj spertoj.

In his writing, he often returns to the idea that everyone acts in accordance with their prior experiences.

Martinus rekomendis sendi pozitivajn pensojn al siaj **malamikoj**.

Martinus recommended sending positive thoughts to one's enemies.



Notoj

The prefix **eks-** is used to show something that isn't current or valid anymore.

For example: **loĝejo** (residence), **eksloĝejo** (ex-residence)

The prefix **mal-** is used to show the opposite or inverse.

For example: **amiko** (friend), **malamiko** (enemy)

The prefix **re-** is used to show repetition or the opposite direction.

For example: **veni** (come), **reveni** (return)

Tradukekzerco

Denmark is a small country.

= _____

I will return soon.

= _____

The ex-parliament member became a journalist.

= _____

Unfortunately he didn't find hope again.

= _____

Love your enemies.

= _____

Plenigekzerco

Vortoj: kaj, pozitivajn, verkisto, revenas, amo, homoj, eksloĝejo

En Kopenhago estas la _____ de Martinus. Martinus estis _____ kaj preleganto pri spiritaj aferoj. Laŭ Martinus ekzistas agrabla bono _____ malagrabla bono. Li kredis je reenkarniĝo kaj je _____ al ĉiuj. Laŭ liaj analizoj ni, _____, estas eksbestoj. En sia verko li ofte _____ al tio, ke ĉiuj agas laŭ siaj antaŭaj spertoj. Martinus rekomendis sendi _____ pensojn al siaj malamikoj.

Kvizo 2

1. Multaj politikistoj loĝas **A)** en sia oficejo. **B)** en la parlamentejo. **C)** en sia loĝejo.
2. La Eiffel-turo en Parizo estas **A)** eksfamaĵo. **B)** bela urboparto. **C)** populara vidindaĵo.
3. Martinus estis verkisto kaj preleganto pri
A) danaj aferoj. **B)** spiritaj aferoj. **C)** agrablaj aferoj.
4. Kiu urbo estas sankta por judoj, kristanoj kaj islamanoj?
A) Rio de Ĵaneiro. **B)** Lasao. **C)** Jerusalemo.
5. Urbego estas **A)** malgranda urbo. **B)** sankta urbo. **C)** granda urbo.
6. “Kial tiu urbo estas vizitinda?”
A) Ĉar ĝi estas malbela kaj malinteresa.
B) Ĉar ĝi estas malsekura.
C) Ĉar ĝi estas bela kaj interesa.
7. En kiu urbo estas ĉiu-jare granda danc-okaz-aĵ-o?
A) En Jerusalemo.
B) En Bruselo.
C) En Rio de Ĵaneiro.
8. Rio de Ĵaneiro estas
A) belega urbo ĉe la maro.
B) sankta urbo por ĵurnalistoj.
C) urbo kun malmultaj dancejoj.
9. En kiu urbo troviĝas parlamentejo de EU?
A) En Parizo.
B) En Bruselo.
C) En Jerusalemo.
10. *eks-*, *mal-* kaj *re-* estas ekzemploj de
A) prefiksoj.
B) prepozicioj.
C) sufiksoj.

Respondoj de la ekzercoj kaj kvizoj

Vojaĝo 1

- 1) Unu piramido.
- 2) Multaj piramidoj.
- 3) Belaj urboj.
- 4) Flugi estas alia afero.
- 5) Niaj nomoj estas Zam kaj Maz.

Vojaĝo 2

- 1) Grandaj urboj.
- 2) Bona ideo!
- 3) Mia ĉefa intereso estas vojaĝi.
- 4) La Sfinkso kaj la Keopso estas interesaj aferoj.
- 5) La UN ne estas nacia organizo.

Vojaĝo 3

- 1) Hodiaŭ mi laboras.
- 2) Morgaŭ mi ne laboros.
- 3) Antaŭ tri tagoj mi estis en la urbo.
- 4) Vi estis en Kairo kaj nun vi estas en Pekino.

Vojaĝo 4

- 1) Mi flugas ofte.
- 2) Estas grava premio.
- 3) Mi vidas bone.
- 4) Vi certe aŭdos.
- 5) En certa okazo.

Vojaĝo 5

- 1) Velingtono estas la plej suda ĉefurbo.
- 2) Mi pensas pli ol mi laboras.
- 3) Kiu lando estas la plej granda?
- 4) Mi pli ŝatas trajni ol busi?
- 5) Mi plej ŝatas flugi.

Vojaĝo 6

- 1) Bonega ideo!
- 2) Mi provadis tutan tagon.
- 3) La nokto estis tre longa. / La nokto estis ege longa. / La nokto estis longega.
- 4) Ili venadis al ni ofte.

Vojaĝo 7

- 1) Tradukantoj tradukas.
- 2) Mi laboris en la oficejo tutan tagon.
- 3) La parlamento kunsidas en la parlamentejo. / La parlamento renkontiĝas en la parlamentejo.
- 4) Mi ne estas dancisto.

Vojaĝo 8

- 1) Ĝi estas bona parlamentano.
- 2) La lokanoj bele dancis.
- 3) Mia urbo ne estas vizitinda.
- 4) Tiu libro estas leginda.

Vojaĝo 9

- 1) La turo iĝas pli kaj pli fama. / La turo pli kaj pli famiĝas.
- 2) Interesa okazaĵo.
- 3) Mi interesiĝas pri dancado.
- 4) Kia stultaĵo!

Vojaĝo 10

- 1) Danlando estas malgranda lando.
- 2) Mi revenos baldaŭ.
- 3) La eksparlamentano iĝis ĵusnalisto.
- 4) Bedaŭrinde li ne retrovis esperon.
- 5) Amu viajn malamikojn.

Kvizo 1

- 1) B 2) A 3) C 4) A 5) B 6) C 7) B 8) A 9) C 10) C

Kvizo 2

- 1) C 2) C 3) B 4) C 5) C 6) C 7) C 8) A 9) B 10) A